

## AVENO #42 - Verdaj Partioj & Esperanto

Januaro - Decembro 2016

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazajhoj, rilato inter la Verdaj Partioj kaj Esperanto

==

2016-11-11 Verduloj en Usono gajnis kelkajn sidajn kaj oficojn.

Ili klopodas shanghi la ne-demokratian 2-partiecan baloto-sistemon.

Mi ankoraŭ ne scias, kiom da vochoj gajnis Jill Stein kiu kandidatis por prezidenteco.

Sed en 2016 entute 33 el 298 kiuj kandidatis por iu ajn publika posteno gajnis seghon en konsilio au administracio - pri kelkaj postenoj de la nuna elekto ankoraŭ mankas la rezulto (sur la listo de gp.org ). Ekzemple en Kalifornio:

- Amelia Anderson (najbareco-konsilio en Los Angeles, en Aprilo 2016 )

- Bastian Hoeks (Mystery Mine Road administracio, estraro, Nevada distrikto )

- Bruce Delgado (Urbestro, Monterey, 2011-11-08 )

- Daniella Mead (Transport, Hollywood Hills, Los Angeles, 2016-05 )

- James Rhodes (Selva Beach, Recreation, Santa Cruz, 2016-11-08 )

kaj multaj pliaj: [http://www.gp.org/2016\\_candidates](http://www.gp.org/2016_candidates)

==

2016-11 Nordamerikaj Verduloj : kontraŭ CETA / Jill Stein kandidatas por US-prezidentino

La prezidantino de la kanada Verda Partio, Elisabeth May, proponis elmeti la temon de la arbitraciaj kortoj el la CETA-traktado; ĉar tiuj damaghus la demokratian decidopovon de elektitaj parlamentoj en EU kaj Kanado.

<https://www.greenparty.ca/en>

Jill Stein celas malfermi la 2-partian sistemon de Usono. Ĉar la 2 „grandaj“ kandidatoj por la prezidenteco ĉefe reprezentas la financ-konzernojn. Feliche la distanco inter Clinton kaj Trump altighis; pro tio eblas voĉdoni pli malferme kaj voĉdoni por Jill Stein. Shi jam ricevis bonan atenton okaze de la publika prezentado de la kandidatoj en Las Vegas, malgrau shia dumtempa restado en malsanulejo. [www.jill2016.com/downticket](http://www.jill2016.com/downticket)

Oni povas imagi ke shi ricevos 5%, kaj tiam la Verda Partio [www.gp.org](http://www.gp.org) ighos rimarkebla kaj serioza partio.

La Verduloj en Usono ankau partoprenas per 250 kandidatoj en la elektojn al federaci-shtataj kaj lokaj parlamentoj kaj konsilejoj.

==

2016-09 Francaj verduloj proponas Esperanton kiel lernobjekto

Jen la retejo de la Esperanto-Komisiono de EELV (Ekologio Europo La Verduloj)

[esperanto.eelv.fr/proposition-programmatique-de-la-commission-esperanto-langues/](http://esperanto.eelv.fr/proposition-programmatique-de-la-commission-esperanto-langues/)

= =

2016-09-04 Milioepartiet / ideologio de Sveda Verda Partio en Esperanto

mi retrovis ke la sveda verda partio montris la Europa Programo kaj sian ghegeneralan ideologion estis tradukita en multajn liingvojn;

aparte menciinda estas la ideologio en Esperanto.

[https://www.mp.se/sites/default/files/mp\\_kortversion\\_partiprogram\\_esperanto.pdf](https://www.mp.se/sites/default/files/mp_kortversion_partiprogram_esperanto.pdf)

= =

2016-07-06 Raporto pri „Luxleaks“ montras imposto-likoj ene de EU

Sven Giegold, MEP, komentis la finan raporton, kiu malgrau tio ke ghi estis malfortigita de centroloj kaj liberaluloj, krome malhelpita de la komisiono, montras la problemojn kiujn EU devas solvi. Ja ne eblas ke ni laboristoj kaj konsumantoj pagas plenan imposton sed internaciaj konzernoj evitas ilin preskau entute, por maksimumigi la profiton de la akciuloj.

<http://www.sven-giegold.de/2016/klare-forderungen-an-die-mitgliedstaaten-nach-luxleaks-enthuellungen/>

Jen detale pri la temo sur la paghoj de la Europaj Verdaj Partioj:

(angle) <http://www.greens-efa.eu/luxleaks-committee-delivers-final-verdict-15720.html>

==

2016-04-18 **Koran dankon por voĉdoni Verde - federaciaj elektoj en Germanio**

La auspicoj estis favoraj en Baden-Virtembergo, dank al gherale bone akceptita chefministro Winfried Kretschmann (30,x%). Sed en Rejnland-Palatinato kaj Saksio-Anhaltio estis nur iomete pli ol 5%.

En Ba-Vi okazas koaliciaj interparoloj inter la Verduloj kaj Kristandemokratoj – la unua fojo kun verdulo kiel Chefministro.

Bedaurinde ekstrema-dekstra partio gajnis pli ol 10% - evidenta tendenco en tuta EU. Chu ĉi homoj jam forgesis la historion de la 20-a jarcento ?

Koran dankon se vi donis vian voĉon al la Verda Partio (au donis iam en via lando) !

Se vi ne konas la nomon de la „Verda Partio“ en via lando, vi povas konsulti la mapon sur la retejo de la Europaj Verduloj au Tutmondaj Verduloj

<https://europeangreens.eu/map>

Jen la Tutmonda Verdpertia Charto en Esperanto: <https://www.globalgreens.org/globalcharter>

au la Manlibron:

2016-02 **nova Manlibro pri EU** – kaj la Verduloj/Regionalistoj/Piratoj

Jen vi trovos la 77-paghan broŝuron en la jenaj lingvoj: de, en, es, fr, aliaj sekvos.

<http://gef.eu/publications/>

Denove:

Mi petas informi min (la AVE-sekretarion) se vi planas partopreni en Liverpool:

**2017-03-30/04-02 Tutmonda Kongreso de la Verdaj Partioj en Liverpool, GB**

Jen la retejo, kie ili kolektas komentoj kaj proponojn pri la programo.

<https://www.globalgreens.org/node/3755>

Ideoj:

Estas interesa informo pri la verdpertia kongreso en 2016. Unu afero, kiun mi delonge volas realigi, estas disponigi tujkursojn pri Eo\* kadre de tiuj grandaj internaciaj kongresoj de homoj iel idee parencaj al ni. Tio ne estus unuavice tasko de AVE, sed ekzemple povus esti organizita kunlabore kun ILEI kaj edukado.net. Eble pripensinda ideo...

\* ekz-e Hans Welling pretas fari rapid-kurson.  
(de Mark Fettes, UEA)

Mi proponus laborgrupon pri la uzindaj lingvoj inter la tutmondaj Verduloj, kaj petus informon de la Indigenaj Dialogoj (se ili ankoraŭ ekzistas).

Manfred Westermayer (sekretario de AVE – supozeble ghis tiu kongreso)

--

2015-11-26 Verduloj en Portugala registaro

Malgraŭ la unua partio estis la centr-dekstra (eŭropfavora), iom neatendite la Prezidento taskigis kiel ĉefministron António Costa, estro de la Socialita partio; lia registaro estas maldekstra koalicio de Socialistoj kaj Komunistoj kune.

- 38,3% - Portugalio antaŭen (centr-dekstruloj eŭropfavoraj)

- 32,4% - Socialista Partio

- 10,2% - Bloko de la Maldekstro

- 8,3% - komunistoj-inkluzive de Verduloj

- 1,4% - Partio ekologia animaldefenda

(dankon al JoKo)